

N-ro 3/2006
17a jaro (2a periodo)



Kjære lesar!

Vel overstått 17. mai!
Som Kai lova i førre nummer, får du i dette nummeret lesa om den supertrivelege hyttturen som NJE skipa til i mars. Dessutan kan du lesa årsrapporten for i fjor. Fjoråret såg mange inspirerande hendingar og tiltak, som omsetjing av *Jen nia mondo* til norsk, nettsider, e-postliste og eit ope protestbrev til TEJO, den verdsvide organisasjonen for esperantoundgom.

God lesnad!

Leif Arne

inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Leif Arne Storset

Fazeolfesto en la malurbo

Kiam la urbo estas tro urba kaj la vilaĝo tro vilaĝa, NJE forfuĝas de ĉio per ekskurso al kabano – por ruli sin en la neĝo kaj lerni pri unu el la plej gravaj konkurantoj de Esperanto.

En bela Lommedalen apud Oslo kuŝis ankoraŭ amaso da neĝo en la mezo de marto. La aero estis freŝa kaj la ĉielo malhela kiam ni iris de la aŭtovojo al la kabano. Kiam oni aŭdas la nomon de la konstruaĵo, *Streptokåken*, oni juste povas demandi sin ĉu ĉi tiu aranĝo estas sana ideo. Sed tia estas la humoro de la veterinaraj studentoj, de kiuj ni luis la kabanon. Ni certe ne vidis streptokokojn kiam ni estis tie, sed ni efektive ne kunportis mikroskopon por kontroli.



Leif Arne Storset, Aleksander Helgaker, Judith P. Mortensen, Kai Salvæsen kaj Anders Berg. Fotis: Signe C.



Kristin Røe, Signe Christophersen, Kai Salvesen, Anders Berg kaj Aleksander Helgaker spektas videojn. Fotis: JPM



Anders faris tre bonajn kaj amuzajn blind-desegnaĵojn. Fotis: JPM

La menciita konkuranto de Esperanto estas Ido, reformita versio de la zamenhofa lingvo sen akuzativo, *mal*-vortoj kaj laŭseksa diskriminacio. Tiu estis la unua kurso en Norvegio en la centjara historio de la lingvo, kaj la instruinto, Kai Salvesen, laŭ nia scio estas unu el du en Norvegio kiuj iam ajn uzis la lingvon. La kabanaro estis absorbata kaj lernis sufiĉe pri la lingvo por pli bone mediti pri Esperanto – aŭ por pli bone imponi ĉe venontaj zamenhofaj festoj.

Kontraŭ la bakteria nomo, la kabanaj defioj – varmigo, kuirado, akvoportado, ekstera necesejo – povas esti multe fortigaj kaj sanigaj. Por havigi signalojn por poŝtelefono oni devas stari sur piedfingroj kun la mano tra la fenestro. Tio ja estas defio pli por la patrinoj de la kabananoj ol por la kabananoj mem.

La kabanekurso havis ne nur defiojn, sed ankaŭ luksaĵojn. Unu luksaĵo estis elektro, per kiu kaj sia *PowerBook* Judith Parelie Mortensen montris videojn pri la

Universalaj Kongresoj en Gotenburgo en 2003 kaj en Vilno en 2005.

Kunklubano de Judith en Trondheim, Kjell Heggvold Ullestad, tradukis *Erasmus Montanus* al Esperanto. Estis gaja konatiĝo aŭ rekonatiĝo kun la komedio – kaj la karakterizaĵoj kiujn faris Ludvig Holberg povas esti same trafaj hodiaŭ kiel antaŭ tricent jaroj.

Interkonatiĝo, -parolado, kaj -rakontado gravegas por tia renkontiĝo, sed dum la vesperoj ni ankaŭ ĝuis bonan manĝon, ludadon kaj legadon de raportoj en la kabanlibro pri antaŭaj esperantistekursoj. Unu el la ludoj estis la kapitalismega *Bohnanza*, en kiu ĉiu bienulo partoprenas en la merkata ekonomio per kulturado kaj komerco de fazeoloj. Tiu merkato tenis nin kapitalistojn maldormantaj ĝis la etaj noktaj horoj.

Ke io faris tion devas esti bona signo pri la sukceso de la ekskurso.

Leif Arne Storset

Grandajn gratulojn

al Judith kaj Jardar kiuj geedziĝos
la 17an de junio!
Ni deziras al vi ĉion bonan
por la festo kaj la kunvivo!

*Amikajn salutojn de
Kristoffer, Leif Arne, Kai,
Aleksander kaj Signe*



Norvega Junularo Esperantista – jarraporto 2005

ADMINISTRADO

Antaŭ la ĝenerala kunveno la estraro (elektita en 2003) konsistis el

Heming W. Thorbjørnsen, prezidanto
Bjørn A. Bojesen, vic-prezidanto
Kai S. Salvesen, sekretario
Leif Arne Storset, kasisto
Signe Christophersen, estrarano
Bård Hekland, estrarano

Post la ĝenerala kunveno ĝi konsistis el

Signe Christophersen, prezidanto
Kristoffer R. Haug, vic-prezidanto*
Kai S. Salvesen, sekretario
Leif Arne Storset, kasisto
Aleksander Helgaker, estrarano
Judith P. Mortensen, anstataŭanto

Kiel revizoron kaj vic-revizoron la ĝenerala kunveno elektis respektive Arne Olav Mjøyen kaj Kristina Kvamme Nygård.

Kiel *pressetalsmann* estis elektata Leif Arne Storset.

Okazis du estrarkunvenoj en 2005 – ambaŭ post la ĝenerala kunveno.

La ĝenerala kunveno okazis en Morokulien, dum la landa kunveno de NEL, la 11an de junio 2005.

NJE havis 28 pagintajn membrojn je 31.12.05 (Je 31.12.04: 20)

ARANĜOJ POR LA MEMBRARO

Okazis membro-kunveno hejme ĉe Leif Arne en decembro. Oni interalie spektis la filmon *Que Sera, Sera*, aŭskultis esperanto-muzikon kaj rigardis fotojn de esperanto-vojaĝoj de Leif Arne. Venis 6 membroj – el kiuj 2 estis novaj en la esperanto-medio.

MEMBRO-LETEROJ

Ni dissendis inform-leterojn al la membroj en majo kaj novembro.

*Ĉar la ĝenerala kunveno ne sukcesis trovi kandidaton, ĝi lasis al la estraro mem trovi vic-prezidanton. (Leif Arne funkciis provizore kiel vic-prezidanto ĝis ni elektis Kristoffer en estrarkunveno en oktobro.)

INTER NI DIRITE

Inter Ni Dirite (IND), la paĝoj de NJE en *Norvega Esperantisto*, aperis 6-foje, kun 3 ĝis 5 paĝoj. Redaktas ĝin la estraranoj laŭ vica sistemo. En IND aperas plejparte movadaĵoj, sed ankaŭ artikoloj en esperanto pri aliaj temoj.

NJE-LISTO

NJE havas retroŝtliston kiu estas malferma al ĉiuj membroj (kaj al aliaj, se la estraro aprobas ilin). La nova estraro decidis provi vigligi ĝin, kaj efektive en la dua duono de 2005 ĝi estis sufiĉe multe uzata – ne nur por informoj de la estraro al la membroj, sed ankaŭ por diskutoj inter la membroj. Cetere, ni translokis la liston al la komputilo de NEL. La nova adreso estas nje-listo@esperanto.no. Administranto de NJE-listo fariĝis Judith Parelle Mortensen.

BONVENIGA PAKAĴO

De novembro 2005 ĉiuj novaj membroj ricevas bonvenigan pakadon konsistantan el bonveniga letero, prov-ekzempleroj de internaciaj revuoj, «ŝlosiloj» kaj diversaj faldfolioj.

ABON-SUBVENCIO

Antaŭ kelkaj jaroj ni ofertis al niaj membroj 50-procentan subvencion por abono de eksterlanda revuo dum unu jaro. En novembro 2005 ni relanĉis tiun servon. Ĉiuj membroj nun rajtas ricevi 50-procentan subvencion por unu revuo dum du jaroj – kaj NJE prizorgas la mendon kaj la pagon.

RETPAĜOJ

De 2004 ĝis fine de 2005 nia retpaĝaro konsistis el simpla, unuopa paĝo sub www.esperanto.no/nje kun enkonduka mesaĝo, listo de la estraranoj kaj ligilo al nia novaĵpaĝo (vd. la jarraporton de 2004). La novaĵpaĝo

estis blogo kiun prizorgis Bård Hekland (lasta ĝisdatigo junio 2005). Ekde la ĝenerala kunveno Aleksander Helgaker estas nia ret-redaktoro. Li ĝisdatigis kaj fine re-enretigis (www.esperanto.no/nje) la malnovan paĝaron kiun kreis siatempe David-Emil Wickström. Al la paĝaro ankoraŭ mankas interalie esperanto-versio, sed ni esperas ke la tuta paĝaro estos preta en 2006.

JEN NIA MONDO

NJE skribis al la Esperanto-Asocio de Britio petante permeson eldoni norvegan version de *Jen Nia Mondo* I kaj II. Ricevinte (provizoran) permeson ni komencis traduki je la fino de la jaro.

PROJEKTO INTERKULTURO

En 2004 NJE petis subvencion de YOUTH (Ung i Europa) por unujara projektperiodo de la projekto *Interkulturo* (en kiu ni estas partnera organizo; vd. la jarraporton de 2004). NJE jure respondacas pri la asignita mono, sed lasis la mastrumadon de ĝi al ILEI. Laŭ peto de la aktivuloj en *Interkulturo*, Barne-ungdoms-og familiedirektoratet (BUFDIR) (kiuj mastrumas la YOUTH-fonduso ĉi-lande) plilongigis la projektperiodon al 1 decembro 2005. Finanraporton pri la projektperiodo estu ricevita de BUFDIR plej malfrue 1 februaro 2006.

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

EN IJK partoprenis du membroj de NJE, Leif Arne Storset kaj Kjetil H. Ree. Sed en la komitat-kunsidoj de TEJO NJE estis reprezentata de Anna-Laura Wickström (Germanio).

MALFERMA PROTEST-LETERO AL TEJO

En junio 2005 *Tejo Tutmonde* (TT), la membra gazeto de TEJO, aperigis artikolon en kiu la

redakcio atakas la kabeintan TEJO-aktivulon Christopher Culver. La estraro de NJE reagis pro la ne-aferecaj person-atakoj kaj pro tio ke la redakcio de TT ŝajne opinias ke ekzistas unu sola vero kiam temas pri esperanto kaj mondaj lingvo-problemoj. Tial ni sendis malferman leteron al la estraro de TEJO en kiu ni interalie postulis ke oni publike petu pardonon al s-ro Culver (vd. *Inter Ni Dirite* n-ro 4). La leteron poste pritraktis la Komitato de TEJO dum IJK. Estis decidate ke la prezidanto prizorgos kontrollegadon de ĉiuj TEJO-publikaĵoj por eviti similaĵojn en la estonteco.

KOMITATANO A

Heming W. Thorbjørnsen estis nia komitatano A en TEJO ĝis li fariĝis prezidanto de TEJO. Poste ni elektis Leif Arne Storset kiel novan komitatano A por la restaĵo de la nuna periodo (t.e. ĝis 2006).

FINANCOJ

La jarkalkulo de 2005 montras profiton de 2 486,80 kr. Bilanco: 26 396,95 kr.

KONKLUDO

En la unua duono de la jaro NJE estis tre ne-aktiva (sed ni sukcesis dissendi leteron al la membroj en majo, kaj la blogo estis konstante ĝisdatigata). Post la ĝenerala kunveno okazis multe pli: Ni aranĝis membro-kunvenon, ricevis permeson eldoni norvegan version de *Jen Nia Mondo*, prilaboris nian retpaĝaron, vigligis nian retpoŝtliston kaj intervenis en la debato pri la tiel nomata *Culver-afero*. Do entute 2005 estis sufiĉe aktiva jaro por NJE.

Venonta IND

La limdato por la venonta *Inter Ni Dirite* estas la 25a de aŭgusto.

Kontribuojn vi povas sendi al Signe Christophersen, ŝia retpoŝtadreso estas: signe.christophersen@student.jus.uio.no

— FINO DE *INTER NI DIRITE* —

Oftaj mallongigoj/Ofte brukte forkortelser

NEL	(<i>uttales nå-e-lå</i>) Norvega Esperantista Ligo (<i>Norsk E-forbund</i>)
NEFA	Norvega Esperantista Fervoĵista Asocio (<i>NSB Esperantoforbund</i>)
NJE	Norvega Junularo Esperantista (<i>Norsk esperanto-ungdom</i>)
UEA	Universala Esperanto-Asocio (<i>Verdensforbundet</i>)
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda (<i>uavhengig radikal politisk organisasjon</i>)
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (<i>ungdomsavdelingen til UEA</i>)
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (<i>lærerorganisasjon</i>)
UK	Universala Kongreso – ĉiujara (<i>årlig</i>) internacia aranĝo de UEA
IJK	Internacia Junulara Kongreso – ĉiujara internacia aranĝo de TEJO
IJK	Internacia Infana Kongreseto – ĉiujare samtempe kun la UK
PIV	Plena Ilustrita Vortaro (<i>standardordboken (ettspråklig)</i>)
TTT	TutTera Teksaĵo (<i>Verdensveven på Internett</i>)